

Pri bibliografio pri Esperanto eldonota de CDELI
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 651, 1983.01.06 & 08

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la pasinta jaro ni plurfoje menciis la interlingvistikan aktivecon de la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. S-ro *Isaj Dratwer* en *Vat-Jam*, Israelo, havas la impreson, ke en tiu ĉi Centro oni vivigas kadavrojn. Aŭskultu citaĵon el unu el liaj leteroj: "Regule mi aŭskultas viajn elsendojn en la internacia lingvo Esperanto, por kiuj mi dankas. Sed ĉesu vivigadi kadavrojn; volapük, ido, occidental, interlingua. Ili eble interesas nur unuopajn esperantistojn."

A.- Antaŭ ol diri kelkajn vortojn pri la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, kiun fakte vizitis s-ro Isaj Dratwer antaŭ pluraj jaroj, ni ankoraŭ deziras citi alian aŭskultanton, S-ron Paul Thomas en Auerbach, Orienta Germanio, kiu skribis pri la Interlingvistika aktiveco en la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds: "Ĉar gesinjoroj Gacond jam ofte parolis pri la aktiveco kaj iuj eventoj en La Chaux-de-Fonds, ni supozas, ke ili vivas en La Chaux-de-Fonds. Ĉu ni pravas? La tiea biblioteko certe estas interesa instituto, ne nur por esperantistoj... Ĉar s-ro Gacond ankaŭ menciis la volapükistojn, eble estos de intereso por vi, ke ni en la plej granda semajna revuo de la Germana Demokrata Respubliko "Wochenpost" legis ampleksan artikolon, favore al Esperanto. En ĝi estis skribite pri volapük: "Kun dia inspiro, kiun li nomis volapük, fine de la 19-a jarcento, la bavara prelato Johann Martin Schleyer faris provon por krei artefaritan mondlingvon. Oni kreis 300 klubojn, aperis 30 ĵurnaloj kaj lernolibroj en 23 landoj, sed dum internaciaj kongresoj mem sinjoro prelato devis tiom ofte rigardi en la vortaron, ke li fine daŭrigis la paroladon germane..." Kaj s-ro Paul Thomas konkludas skribante: "Interese, ĉu ne?"

C1.- S-ro Paul Thomas pravas, kiam li divenas, ke ni loĝas en la urbo La Chaux-de-Fonds. Guste en la biblioteko de tiu ĉi urbo la dokumentaro kaj libraro de Edmond Privat trovis savejon. Ekde la jaroj 1964 ilin ekordigis bibliotekistino kaj ilin ekesploris gimnazia profesoro nomata Pierre Hirsch. La rezulto de tiu serĉado estas fakte interesa libro pri la korespondado inter la franca verkisto Romain Rolland kaj Edmond Privat. Alia rezulto estis tre interesaj ekspozicioj. Nun ekzistas en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds muzeeto Edmond Privat, kaj bibliotekistoj pretigas sin al trapaso de diplomlaboro ordigante parton el la riĉaĵoj de tiuj arkivoj, kiuj rilatas al la sendependiĝaj luktoj de multaj popoloj, interalie Hindio, Pollando, al la pacismaj movadoj, interalie la mondfederalistoj, la internacia civila helpservo, al religiaj movadoj, interalie la kvakerismo, kies membro estis Edmond Privat. Oni ankaŭ trovas abundan dokumentaron pri Esperanto, Ligo de Nacioj, socialismo, kooperativismo, ktp.

A.- Ĉar la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds akceptis la arkivojn de Edmond Privat, estis tute nature proponi al ĝi tiujn de Svisa Esperanto-Societo kaj de Hans Jakob, eksdirektoro de UEA. Ek de la jaro 1967 ili formis la bazon de tre grava dokumentejo, kiu ricevis la nomon Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI). Kaj mia edzo sensalajre komencis dediĉi ĉiusemajne duonan labortagon al la ordigado de tiu ĉi materialo por helpi bibliotekistinon en la kataloga laboro. Mi baldaŭ ankaŭ alportis mian helpon, same kiel aliaj esperantistoj.

C1.- Originalaĵo de tiu Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia estas ties neŭtraleco rilate al la planlingvoj. Ĝi rikoltas kaj ordigas ĉion, kio estas en rilato kun la

planlingva idealo. Kaj en la Konsulta Komitato de CDELI, tio estas la mallongigo de la Centro, apud la reprezentantoj de la esperantismo ankaŭ troviĝis malamiko de Esperanto, unue André Schild, adepto de la lingvo Interlingua, kaj nun Alphonse Matejka, unu el la lastaj adeptoj de la lingvo Occidental. La malfacilaĵo certe estas, ke tiuj kontraŭuloj de Esperanto iom post iom malaperas. Kaj kun ilia morto ankaŭ mortas la lingvo-projektoj, al kiuj ili dediĉis sin kun entuziasmo.

A.- Pro tiu ĉi scienca neŭtraleco CDELI rapide riĉiĝis. Pioniroj apartenantaj al ĉiuj tendencoj heredigis al ĝi siajn arkivojn kaj librojn. La rezulto estas, ke hodiaŭ CDELI estas unu el la plej riĉaj dokumentoj pri Esperanto kaj interlingvistiko en la mondo. La studentoj, kiuj devas pretigi tez-laboron pri interlingvistiko devas ĝenerale viziti tiun CDELI, same kiel tiuj, kiuj interesiĝas pri la historio de Esperanto.

C1.- En 1979 CDELI ricevis tre belan laborsaloonon, kie deko da laborantoj povas agrable plenumi sian funkcion. Unu el la ekskursoj de la Universala Kongreso okazinta en Lucerno estis ĝuste la vizitado de tiu salono en La Chaux-de-Fonds.

A.- Kaj ekde tiam alvenis petoj el multaj flankoj, por ke CDELI eklaboru al la redaktado kaj publikigo de bibliografio pri Esperanto kaj interlingvistiko. La pasintan jaron la komitato de la biblioteko kaj la aŭtoritatoj de la urbo La Chaux-de-Fonds decidis doni pozitivan sekvon al tiu ĉi peto. Kaj la Svisa Komisiono por Unesko alportis sian aŭspiciadon al tiu bibliografio, kies unua kajero pri la jaro 1983 aperos en aŭtuno 1984.

Cl.- Por efektiviĝi tiun ĉi bibliografian laboron bibliotekisto laboros por CDELI dum po du tagoj semajne. Jam estas li, kiu jam ekde multaj jaroj katalogas ĉiujn lundojn matene la librojn de CDELI. Tiu ĉi katalogado pludaŭros, kaj kiam ĝi estos finita, povos eldoni ĝenerala bibliografio pri la jaroj antaŭaj al 1983.

A.- Tiu bibliografio pri Esperanto kaj interlingvistiko registros la librojn kaj revuojn en kaj pri Esperanto kaj en kaj pri aliaj planlingvoj. Ĝi fine donos ekzaktajn sciigojn pri ĉio aperanta rilate al tiu ĉi temo, kondiĉe ke CDELI ricevu la koncernajn librojn kaj revuojn. Tial kunlaborvokoj estis dissenditaj al la eldonejoj, redakcioj kaj al la esperanto-societoj. La direktoro de la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds esperas, ke tiuj ricevontoj de la alvoko pozitive reagos, havigante al CDELI po unu ekzempleron de ĉio, kion ili eldonas.

Cl.- Tiu ĉi eldonado de bibliografio pri Esperanto kaj interlingvistiko ekde tiu ĉi jaro 1983 estas tre grava evento. Ĝi estos unu el la kontribuaj, kiujn Svislando alportos al la festado de la centjara jubileo de Esperanto. Estas nun konata fakto, ke el ĉiuj planlingvoj nur Esperanto farigis vere vivanta lingvo. Sed tio ne malhelpas lingvistojn aŭ serĉantojn daŭre esplori, ĉu ne ekzistus pli taŭga solvo. Tiu ĉi fakto eble malplaĉas al esperantistoj kiel nia israela aŭskultanto *Isaj Dratwer*. Li sciu, ke CDELI neniel vivigadas kadavrojn. Ĝi nur amasigas kiel eble plej abundan materialon, kiu estas je la dispono de scienculoj. Kaj estas fakto, ke se pioniroj de ido, occidental kaj aliaj planlingvaj projektoj kontribuis al la riĉiĝo de CDELI, hodiaŭ nur esperantistoj ekzistas por trastudi tiun ĉi dokumentaron.

A.- Kiel skribis nia germana aŭskultanto Paul Thomas, la aliajn lingvojn kiel volapük oni praktikis malpli facile ol Esperanton. Al la interlingvistoj apartenas nun klarigi kial, drandparte dank' al la materialo, kiu troviĝas ĉe CDELI en La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la laboro de CDELI. Ĝis reaŭdo!